No. 1. 1933.

# BULTENO

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám, 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas: Dr. ST. KAMARYT Dr. A. PITLÍK*

*Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.*

## EK AL LABORO POR ĈAE KAJ ESPERANTO!

*„En organizo estas forto!"* — Jen devizo, proklamata de ĉiuj movadoj, sekvantaj celojn kulturajn aŭ politikajn, jen proverbo, kies interna vero kaj ekstera sukceco estis elprovitaj de la iniciatintoj kaj gvidantoj dum multjara nervostreĉa penado kaj per grandegaj elspezoj financaj. — Esperanto estas ne sole lingvo, helponta homojn ĉiurilate, sed — per sia „interna ideo" — ĝi fariĝis samtempe ankaŭ programo kaj alta celo de la homaro, atingota ne sole helpe de la „leĝoj lingvaj kaj moralaj, donitaj de la majstro dro Zamenhof, sed ankaŭ per senĉesa kaj daŭra kunlaborado de ĉiuj veraj esperantistoj-samideanoj. *Esperantista movado estas movado viva,* homa, ĝi devas do, por atingi la fiksitan celon, uzi ankaŭ rimedojn vivajn, homajn kaj — por ne perdi per nova eksperimentado tempon, fortojn kaj monon — jam aliloke elprovitajn, *ĝi devas organiziĝi.*

La bezono al organizado de la esperantista movado je internacia flanko estas jam delonge rekonita. Dudek kvin jarojn bone funkcias jam Universala Esperanto-Asocio, dek jarojn funkciis Internacia Centra Komitato; oni postulas eĉ „reorganizon" de la ĝisnuna internacia esp. organizo, forgesinte, ke bona internacia organizo supozas *firmajn organizaĵojn naciajn* (ŝtatajn), da kiaj ĝis nun ne multe ekzistas, ĉar la plejparto da ili troviĝas ankoraŭ en stato embria!

Ni Ĉeĥoslovakoj posedas, jam depost la j. 1920 funkciantan, *Ĉeĥoslovakan asocion esperantistan,* internacie rekonitan reprezentanton de la esperantista movado en ĈSR, morale firman, bone estratan kaj administratan. En ĝia komitato sidas homoj spertaj, kiuj samtempe estas funkciuloj de ĈEI, Soĉne, esper. kluboj de Praha kaj la plej viglaj provincaj, redakcioj de Progreso kaj Ligilo, UEA, LK, ŝtataj ekzamenaj komisionoj, altlerneja lektorato k. t. p., do „reprezentantoj" (ĝis nun bedaŭrinde nur „privataj") de preskaŭ ĉiuj gravaj faktoroj de la ĉs. esp. vivo. Dezirinda estus partopreno je la laboroj de ĈAE ankaŭ flanke de la ĉs. katolikaj kaj laboristaj esperantistoj. Oficiala aliĝo de ĉiuj suprenomitaj institucioj same de GEL, REL kaj aliaj al ĈAE, iam transformota en „Ĉeĥoslovakian" A. E., estas idealo de la estonteco, sed facile efektivigebla de celkonsciaj, praktikaj kaj bonvolaj gesamideanoj! Ĝis tiu tempo ĈAE memkompreneble amike kunlaboros kun ĉiuj, atendante la samon de la aliaj en intereso de la progreso de esp. movado en ĈSR kaj eksterlando.

Por helpi plenumi la internacian programon de esperanto kaj precipe ĝian ĉeĥoslovakan parton, por atingi plenan respekton al esperanto flanke de la neesperantista publiko kaj direktodonaj lokoj oficialaj, ĈAE bezonegas helpon — moralan kaj financan — de ĉiuj, kiuj deziras esti nomataj „ĉs. esperantistoj". La plej simpla kaj facila helpo estas membriĝo al ĈAE, kiu malgrandan kotizaĵon redonos al la aliĝinto multfoje en formo de la priesperantaj informoj, konsiloj kaj intervenoj, disponigante al siaj membroj ankaŭ senpagan „Bultenon", oficialan sian organon, memstare de nun aperantan laŭ decido de la lasta ĝenerala kunveno en Hradec Králové.

*Membroj de ĈAE, esperantistoj kaj amikoj de esperanto en ĈSR!* Informu regule la redakcion pri por- kaj peresperanta agado Via kaj tiu de Via klubo kaj ĉirkaŭaĵo, estu en senĉesa kontakto kun ĈAE, kiu ĝoje rekonos *ĉies* honestan laboron porerperantan kaj restos al Vi dankema, se Vi helpos varbi novajn membrojn, novajn kunlaborantojn kaj estontajn pionirojn de esperanto.

*Venko de ĈAE estos ankaŭ venko de ĉiu opa ĉs. samideano!* Do aliĝu kaj kunlaboru, por povi iam fiere diri, ke venko de esperanto kaj de ĈAE bazas ankaŭ je Via laboro. *Ne staru flanke de la batalo por esperanto! Ni ĉiuj unuiĝu! Per unuigitaj fortoj antaŭen! En organizo estas forto!*

Dr. Aug. Pitlík.

## La XIVa ĝenerala kunveno

de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista okazis la 19-an de marto 1933 en Hradec Králové en restoracio Adalbertinum.

Ĉeestis 61 membroj, skribe reprezentitaj 76 membroj, sume 137 membroj. La ĉeestintaj membroj estis el 24 lokoj en Bohemio, 3 lokoj en Moravio, 4 lokoj en Slovakujo, sume el 31 lokoj. La ĉeestintaj membroj estis el Bakov n. J., Bělohrad, Bratislava, Brno, Červený Kostelec, Černilov, Česká Lípa, Hradec Králové, Holovousy, Chválovice, Jabloné n. O., Jičín, Kolín, Košice, Kukleny, Lubná, Mladá Boleslav, Mnichovo Hradiště, Nymburk, Petrovice, Praha, Praskačka, Přelouč, Příbram, Piletice, Pouchov, Prostějov, Šárovcova Lhota, Slavkov, Tisovec, Zvolenská Slatina.

La kunveno estis malfermita je la 9-a horo kaj daŭris ĝis 13 h. 30 m.

Malfermante la kunvenon la prezidanto dankis al la urbestraro pro afabla akcepto, al la E. Klubo en Hradec Králové pro la bona preparo de la kunveno kaj al la lokaj ĵurnalistoj, precipe al Osvěta Lidu, pro la tre progresema intereso, kiun ĝi montris pri nia agado. El la gastoj li salutis esperantistan rondeton de la pastra seminario en Hradec Králové.

La rememoro de mortintaj membrinoj Frant. Řeháková (Horní Kostelec) kaj Marta Zbavitelová (Košice) estis honorigita per ekstaro.

Salutleteroj kaj telegramoj venis de Universala Esperanto-Asocio, Franca societo, Hungarlanda societo, G.E.L., Ligo de katolikaj esperantistoj en ČSR., Internacia Turisma Asocio Instruista, Kluboj en Bratislava, České Budějovice, Košice, Mladá Boleslav, Pardubice, Plzeň, Tisovec, gesinjoroj Bujarek, Cikhardt, Dandová, David, Dr. Dolák, Feldmanová, Harna, Hejna, Jakubec, Jandík, Dr. Konečný, Kopal, Krisl, Kučera, Kudela, Lukáš, Mastný, Dr. Mersič, Plos, Slaný, Sprušanský, Straka, Šupichová, Uhrová-Křivancová, Vlčková, Votrubec.

En la nomo de Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto diris saluton ĝia prezidanto Dr. Pitlík, informante pri la ĝisnunaj laboroj sur kampo prelega kaj instrua. Li precipe atentigas pri la nun daŭranta kurso por kandidatoj de la „ŝtataj“ ekzamenoj, el kiu povas rezulti rimarkinda nombro de sukcesaj kandidatoj. La Instituto kunlaboras kun la Asocio en sia speciala agadkampo. La prezidanto Dr. Kamaryt rekomendas la agadon de la Instituto al atento kaj apogo de la ĉeestantoj kaj esprimas la deziron, ke ĉiuj funkciuloj de la Instituto estu ankaŭ niaj membroj.

1. **Protokolo** pri la lasta ĝenerala kunveno. Ĉar ĝi estis publikigita, la kunveno konsentas ne legi ĝin kaj aprobas ĝin ĉiuvoĉe.

2. **Raporto de la komitato pri la agado kaj pri la kaso.** Ĉar ĉiuj membroj ricevis ĝin presitan en 49-a n-ro de Bulteno, la kunveno konsentas ne legi ĝin, sed tuj diskuti pri la koncernaj alineoj. La prezidanto informas, ke li raportos pri venintaj proponoj kaj sugestoj de membroj tuj ĉe la koncernaj punktoj de la raportoj.

a) V a r b a d o  d e  l a  m e m b r o j. S-ro Friedrich raportas pri rezulto de la enketo de li iniciatita. La cirkulero estis sendita al 58 adresoj de kluboj kaj rondetoj. Respondoj venis el 32 lokoj. Por tio estis bezona urĝanta nova cirkulero. El la respondoj sekvas, ke laŭ promeso de la respondintaj kluboj rezultus el malaltigo de kotizo por k l u b a n o j kresko de membroj je 180 el kluboj promesantaj membrigi ĉiujn siajn anojn kaj je ĉirkaŭ 200 el kluboj promesantaj labori en niaj intencoj laŭ ebleco. La raportanto proponas provi tiun ĉi grandigon de nia nombro membra. La prezidanto dankis al la raportinto kaj atentigis, ke nombro de la respondintaj grupoj signifas per si mem pruvon pri nuna vigleco de esp-ista vivo. Kiam simila enketo estis dissendita en j. 1929 al la sama nombro de kluboj, venis respondoj sole el 7 grupoj. Sekvis vigla diskuto, kiun partoprenis s-roj dr. Marek, Sklenčka, Linke, dr. Fousek, Mareš, Jandík, Pytloun kaj kiu rezultis en decido, proponi al ĉiuj grupoj, ke ni p r o v i z o r e por tiu ĉi jaro akceptos de iliaj membroj kotizon sole 10 Kč sub jenaj kondiĉoj: La grupo membrigas ĉiujn siajn anojn, pagante la kotizon por ili. Minimume devas la grupo pagi por siaj 8 membroj. Tiu rabato koncernas sole tiujn niajn anojn, kiuj estas samtempe membroj de la lokaj grupoj. Ĉar tiu ĉi aranĝo estas nur provizora, ni rekomendas al la grupoj ne malaltigi siajn kotizojn pro tiu ĉi kaŭzo. La detalojn fiksos la komitato kaj turnos sin al la grupoj kun speciala cirkulero pri tiu ĉi aranĝo.

b) A d m i n i s t r a d o  d e  m e m b r o j. La kasisto petas korekti en la listo, ke en Komárno estas 3 anoj, ne 2, kiel estas pro eraro enskribite en la raporto.

c) P u b l i k i g a  a g a d o. Sklenčka rekomendas daŭre uzi la afiŝojn kaj la poŝtkartojn, por ke ili baldaŭ estu elĉerpitaj. Same li rekomendas ofte dissendi la flugfolion „Jeden jazyk“. S-ro Friedrich raportas pri granda intereso por nia movado precipe en orienta Slovakio, el kiu rezultas rapida vendo de niaj presaĵoj. Ĉar la slovaka ŝlosilo estos baldaŭ elĉerpita, li proponas aperigi la duan eldonon, ĝi estis akceptita. Ginz klarigas, ke pri Praha estis la gvidfolio eldonita, ĉar la urbo donis subvencion por tio. ĈAE estas ĉiam preta eldoni similan gvidfolion ankaŭ pri aliaj urboj, se la tieaj esperantistoj prizorgos la financan flankon de la eldono.

d) Kontakto k u n  o f i c i a l a j  a ŭ t o r i t a t o j. Dr. Pitlík, lektoro de Esperanto ĉe Teknika altlernejo, raportas, ke per ministeria dekreto pro ŝparemo kun kelkaj aliaj lektoratoj estis la lektorato de Es-

peranto nuligita, kaj pentras la penigan vojon, kiun li estis devigita iri por akiri ŝanĝon de tiu dekreto. Tio fine sukcesis kaj la lektorato estas denove starigita sed senpage. Li montras kaj citas koncernajn dekretojn. La prezidanto gratulas al dro Pitlík pro tiu ĉi sukceso kaj dankas lin en nomo de la tuta movado, ke tiom grava institucio estis konservita. Dro Pitlík rekomendas turni sin kiom eble plej ofte al publikaj aŭtoritatoj kun petskriboj kaj informoj.

e) L e r n e j a j  a f e r o j. La prezidanto informis pri metodo aplikita de ministerio pri rezultoj de la komisiono de ekspertoj. Dro Pitlík insistas pri graveco de publikjuraj ekzamenoj (ŝtataj) kaj rekomendas, ke pluraj sin anoncu. Hromada insistas, ke ni rekomendu precipe al instruistoj kaj profesoroj fari la ekzamenon; por ili ĝi ne estas malfacila. Krisl proponis letere, ke oni aranĝu similan kurson al la nuna Instituta kurso por kandidatoj dum unu semajno libertempa; la propono estis transdonita al Instituto por ĝin esplori. Vítek kaj Pytloun proponas eldoni prese materialon por kandidatoj de ekzamenoj. Dr. Pitlík informas, ke Instituto planas tian eldonaĵon. Dr. Pitlík kaj Kamaryt atentigas pri ebleco de privataj ekzamenoj pri scio de espo laŭ aranĝoj ĉe Instituto. Fr. Staněk tre varme rekomendas la „institutajn ekzamenojn" kaj la prezidanto konstatas ĝeneralan aprobon de tiu aranĝo. La diskuton ankoraŭ partoprenis dro Fousek kaj Havránková. Harna proponis letere, ke la kunveno danku al s-o Neužil pro lia persista instruado en lernejo kaj kursoj; estis akceptite sen diskuto.

f) P r o p a g a n d o  ĝ e n e r a l a. Dr. Marek esprimas miron, ke kompare kun nombro de ĉsl. esp-istoj ne aperas en esp-a gazetaro sufiĉe ofte artikoloj de niaj samnacianoj kaj pri ĉeĥoslovakaj temoj. Esprimis similan opinion dro Kamaryt, dro Pitlík, Friedrich. Oni decidis rekomendi al ĉiuj niaj anoj, ke ili klopodu pli ofte publikigi siajn verkojn en esp-a gazetaro.

g) P r o p a g a n d o  p e r  g a z e t o j. Ginz atentigis, ke la gazetara servo kribris sian nomaron de kunlaborantoj kaj tial estas ĝiaj cirkuleroj sendataj nur al 150 adresoj. Dro Fousek petas, ke oni ne estu ĉiam tro severa en tia strekado, ĉar iam la adresato uzas la sciigojn, kvankam li ne sendas la dokumentojn. Li petas, ke oni ree metu lin en la liston de kunlaborantoj de la gazetara servo. Šupichová sendis raporton pri siaj rezultoj en gazetara propagando. En Národní Politika aperis dum 1932 ŝia kroniko „El Esperanta mondo" 56 foje, kurso en Slovíčko 22 foje, en Mladý svět 21 foje, kun aliaj artikoletoj aperis dum 1932 de ŝi sume 118 artikoletoj. Ĉiuj estas de ŝi originale verkitaj. La kunveno esprimis al ŝi apartan dankon pro la daŭra laboro. Estis montrita kolekto de eltranĉaĵoj ĵurnalaj kun priesperantaj artikoloj. Ĝi estas tre zorge farata kaj aranĝata de Miloslav Staněk.

h) P r o p a g a n d o  e n  f a k a j  r o n d o j. Kudela rekomendas letere, ke ni provu pli intensan kunlaboron kun turistoj kaj pacifistoj precipe por posta efektivigo de komuna semajna gazeto.

ĥ) R a d i o. Pluraj letere venintaj proponoj rekomendas samtempan disaŭdigon de Brno kaj Bratislava el Praha (Cikhardt, Friedrich, Harna). La prezidanto atentigas, ke la ĉefa celo de Esperanto-disaŭdigoj estas aŭskultado en fremdlando. El la diskuto, kiun partoprenis dr. Pitlík, Šustr, Hromada, Vondroušek, Kožený, Heikenwälder, Ginz, Friedrich rezultis decido danki al Radio-Ĵurnalo pro nuna sintenado kaj rekomendi al niaj membroj, ke ankaŭ ili sendu al ĝi konfirmojn pri sia aŭskultado (kompreneble nacilingve).

i) T u r i s m o. Linke atentigas, ke tiun ĉi jaron estas en Lázně Bělohrad aranĝata dum julio-aŭgusto dua somerrestadejo. Ĝi estas entreprenata de la lokaj esperantistoj sub protekto de la urbo, kiu donis jam subvencion. La nova varba gvidlibro jam aperis. La kunveno kun danko akceptis tiujn informojn kaj deziras plenan sukceson al la entreprenema urbo. Precipe ĝi petas samideanojn, loĝantajn en proksimo de Lázně Bělohrad, ekskursi dum la sezono en la banlokon kaj almenaŭ tiel subteni la entreprenon kaj al si mem havigi eblon de senpera persona kontakto kun fremdlandaj samideanoj tie libertempontaj.

j) Ĉ e ĥ o s l o v a k a  A n t o l o g i o. Jandík rekomendas letere, ke la laboroj pri ĝi rapidiĝu kaj proponas sin al kunlaborado. La propono trovis ĝeneralan aprobon kaj oni ĝin varme rekomendis al la komitato.

k) K a s o. La prezidanto sciigas, ke detala raporto kun ĉefaj kontoj estas en pluraj ekzempleroj je dispono de la ĉeestantaro. Estis aprobita propono de la komitato doti la Ekzamenan fondaĵon per Kĉ 384·90 kaj la Oficejan per Kĉ 400·—.

3. **Raporto de la revizoroj.** La prezidanto informas, ke la kontrola komitato elektis kiel sian prezidanton s-ron V. Černý, kiu faris detalan kontrolon pri niaj kasaj libroj kaj dokumentoj, kaj petas lin doni sian raporton. V. Černý legis: „Komisiite de konfido de sinjoroj anoj de kontrola komitato kaj petita de la prezidanto s-ro dro St. Kamaryt, mi faris revizion de financa administrado Asocia dum 1932. Per detala kontrolo de librotenaj dokumentoj kaj de unuopaj konteroj mi konvinkiĝis, ke ĉiu librotenado estas farata kun taŭga zorgeco kaj konscienceco. Ankaŭ bilancojn ferman kaj pri perdogajno por 1932 mi kontrolis, komparis kun detale kaj zorge ellaborita raporto kasa kaj trovis ĉion en absoluta ordo. Pro tio mi rekomendas al la ĝenerala kunveno aprobi la bilancojn pri 1932 kaj senŝarĝi la pasintjaran komitaton. En Hradec Králové 15-a de marto 1932". Poste estis raportoj pri agado kaj pri la kaso ĉiuvoĉe aprobitaj.

4. **Asocia organo.** La prezidanto informis, ke venis pluraj proponoj pri nova aranĝo de Klubo en Mladá Boleslav, Friedrich, Jandík, kaj ke la komitato detale traktis pri ĉiuj eblecoj en kunvenoj 7-an kaj 18-an de marto. Li kun ĝojo konstatis, ke same en korespondado kiom en persona traktado montriĝis spirito tre amika kaj tendenco labori al plia prosperigo de nia afero kaj malatento de propraj personaj interesoj. La sola riproĉo por ĝisnuna organo estas, ke Progreso ne aperas regule kaj ke pro tio niaj membroj riproĉas komitaton, kvankam ĝi ne kulpas pri aperado. Samideano Hromada klarigas novan neregulan aperadon per troa okupiteco profesia. Tiun senkulpigon certe ĉiu devas respekti, tamen ne estas eble postuli de niaj membroj, ke ili daŭre konsentu ne ricevadi regule la Bultenon. Krom tio ĝenerale vidiĝas postulo, ke niaj membroj ricevu ian presaĵon de ni sen plua pago de abono por revuo. La komitato venis en plene amika interkonsento al propono, ke Bulteno estu eldonata sendepende de la ambaŭ aperantaj gazetoj 6 foje dum la jaro 4—8 paĝoj. Dum tiu ĉi jaro aperos ankoraŭ 5 numeroj, ĉar ĉiuj membroj jam ricevis la 49-an numeron. Tiun aranĝon trovas la komitato plej taŭga solvo en tiu ĉi momento. La prezidanto trovas justa ĉe tiu ĉi okazo ne sole danki al la eldonanto de La Progreso, ke li pro saĝa kompreno de la situacio faciligis la traktadon, sed gratuli al li kaj al la movado, ke Progreso ne malaperos, sed daŭrigos sian laboron propagandan kaj klerigan. Rilatoj inter la komitato de la Asocio kaj redakcio de La Progreso restos daŭre amikaj. Tial la prezidanto povas rekomendi al ĉiuj abonintoj resti fidelaj al La Progreso. En la hieraŭa kom. kunveno deklaris s-o Hromada kaj Heikenwälder, ke iliaj gazetoj, Progreso kaj Ligilo, kunlaboros lojale kaj konscie sur linio de la Asocio. Tio estas speciale salutinda kaj dankinda.

S-o Hromada informas, ke la nunaj malhelpoj por regula aperado de Progreso estis efektive grandaj. Por eviti similan danĝeron en estonto kreiĝis rondeto el novaj kunlaborantoj, kiuj helpos ne nur en redaktado, sed ankaŭ en administrado. Unua numero de la nova jarkolekto baldaŭ aperos. Li deziras al la Asocio, ke ĝia anaro kresku plej rapide, kiam nun oni ne povos plendi pri neregula aperado de la Bulteno.

Sklenčka atentigas, ke ne temas sole pri kresko de membra nombro, sed ankaŭ pri kontenteco de membraro ĝenerale.

Heikenwälder deklaras, ke Ligilo ne estis fondita por kontraŭbatali Progreson, sed simple por informi ĉsl. esperantistojn, kiam P. ne aperadis. Nun, kiam ĝi havas konsiderindan nombron de abonantoj, ĝi ne povas ĉesigi la aperadon. Sed li promesas, ke li kunlaboros lojale.

Kožený esprimas konvinkon, ke oni solvis la problemon pri Asocia organo kontentige kaj en formo por ĉiuj akceptebla.

La prezidanto resumante rememoras la meritojn, kiujn havas Progreso pri la Asocio kaj pri la movado, deziras al ĝi pluan disvolvon kaj balotigas pri la komitata propono. Ĝi estas akceptita ĉiuvoĉe.

5. **Internacia reorganizo.** La prezidanto rememorigas, ke hieraŭ vespere li klarigis detale en sia prelego la argumentojn de UEA kaj de UFE kaj ke la vigla diskuto de partoprenantoj de la vespero donis tian bildon al la komitatanoj, ke ili povis en poste sekvinta kunveno komitata fari tekston de rezolucio, kiu povus esti akceptita de ĉiuj kaj helpi ankaŭ al klarigo de nuna situacio. Li legas la tekston:

*XIV-a jarkunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista la 19. III. 1933 en Hradec Králové ekzameninte statuton de UFE, trovis ĝin netaŭga, precipe pro alineo pri praktikaj servoj, kiu estas nelogikaĵo en statuto de federacio reprezentonta la plej altan instancon de la movado.*

*Ni trovas nepre necesa ekziston de memstara centro de la naciaj societoj propagandaj kaj ni samtempe konstatas, ke kunlaboro inter la nacia societo kaj UEA funkciis en nia lando kontentige por la ambaŭ societoj.*

*Ni miras, kial la samaj gvidaj personoj trovis en Parizo nunan tempon oportuna por fundamentaj ŝanĝoj en universala organizo, kvankam en Krakova kongreso oni konstatis laŭ ilia propono, ke la situacio estas ekstreme maloportuna. La situacio tamen ne ŝanĝiĝis.*

*Ni bedaŭras disrompon de la „Kontrakto de Helsinki“, antaŭ ol alia sistemo de organizo estis starigita kaj akceptita inter la du kontraktintaj instancoj.*

*Tial ni rekomendas al ĉiuj naciaj societoj prokrasti la definitivan decidon kaj remeti la temon sur tagordon de kunveno de KR en Kolonjo kun celo starigi novajn principojn kiel bazo de rea traktado kun UEA.*

*Kotizon pagotan laŭ malnova sistemo ni havas sur aparta konto tuj pageblan kaj rezervos ĝin ankaŭ dum tiu ĉi jaro por kaso de internacia centro de naciaj societoj.*

*Ni esperas, ke la nuna ĥaoso konvinkos tiun centron same kiel la nunan UEA pri bezono pli alte ŝati la staton, kiu estis en Parizo rompita sen grava motivo.*

La rezolucio estis akceptita ĉiuvoĉe.

6. **Elektoj.** La prezidanto sciigas, ke el komitato eliras pro 3-jara funkcio Hromada, Kamaryt, Sklenčka, pro rezigno Mil. Staněk, Brambora kaj Herzigová. Ĉar la du lastaj ne kandidatas, li uzas la okazon por danki al ili publike pro la servoj, kiujn ili faris per sia kunlaborado en nia komitato. Precipe s-ino Herzigová havas grandajn meritojn pri nia kaso, ĉar ŝi dum pluraj jaroj zorgis kiel kasistino de E. K. en Praha pri samtempa enkasigo de

Asocia kotizo de la klubanoj. La komitato proponis por la 6 vakiĝintaj lokoj s-ojn Echtner, Hromada, Kamaryt, Kožený, Sklenčka, Slavík. Ĉiuj estis elektitaj ĉiuvoĉe. Kiel vickomitatano estis elektita sur lokon, malpleniĝitan de Slavík, Staněk Mil. En kontrolan komisionon estis elektitaj ĝiaj ĝisnunaj anoj krom rezigninta Mastný. Anstataŭ li estis elektita s-o Linke. Vicmembroj de kontrola komitato estis elektitaj la ĝisnunaj. Ĉiuj elektoj okazis ĉiuvoĉe.

Ĉiuj ĉeestantaj akceptis la elekton.

La listo rezultinta el tiuj elektoj estas sur paĝo 6.

7. **Liberaj proponoj.**

a) Inviti universalan kongreson al Praha por 1935. La proponon prezentis en nomo de la komitato dro Pitlík. Principe akceptite kun deziresprimo, ke la komitato decidu pri la jaro kaj pri la ceteraj aranĝoj laŭ la ŝanĝanta situacio.

b) Aranĝi Esp.-tagon en Jičín dum Ekspozicia Foiro 10.—15. VII. La proponon prezentas Mareš. Rekomendas ĝin s-o Linke. Rekomendita al la komitato por decidi post interkonsento kun Teritoria oficejo.

c) Aranĝi Esp.-tagon en České Budějovice. Proponon faris Ploss. Decidite same kiel pri Jičín.

Prezidis Kamaryt. Protokolis Tarantíková.

## Amika vespero,

destinita por interkonatiĝo de partoprenantoj kaj ilia reciproka informiĝo, okazis 18-an de marto je la 20-a horo. La ĉambro estis plena.

La kunvenon malfermis prezidanto de la E. Klubo en Hradec Králové s-ro Šnajberk, salutante la ĉeestantojn kaj transdonante gvidon de la kunveno al la kluba sekretario s-ro Sklenčka. Je nomo de la urbo salutis la kunvenon konata turista laboranto direktoro Kašpar, delegita de la urbestro. S-ro dro Kamaryt dankis la urbon kaj la ĵurnalojn de Hradec Kralové, precipe al „Osvěta lidu“ pro la gastama akcepto de la kunveno kaj pro detala informaro. Osvěta lidu eĉ enpresis sur titolpaĝo portretojn de la Asociaj prezidanto kaj vicprezidanto.

Poste dro Kamaryt en ĉeĥlingva prelego diris sian opinion pri diversaj samtempaj problemoj de la movado, precipe pri „disputo“ reorganiza. Ni estas esperantistoj pro firma konvinko, ke plibonigo en farto de la homaro estas efektivigebla per racionalaj metodoj, bazantaj sur apliko de la homaj rezono kaj eksperimento. Ekzemple metodo aplikata por enkonduko de neologismoj estas esence metodo eksperimenta. Ankaŭ pri internacia reorganizo ni ne timas eksperimenti. Sed antaŭ eksperimenti konstato de la situacio estas nepra neceso. UEA havas signifon precipe pro tio, ke ĝi kreis reton de delegitoj, kiun povas uzi ĉiu, kiu ĝin bezonus. Malkontento esprimata pri ĝia funkcio devenas el tio, ke multaj UEA-noj nebezonas la proponatajn servojn, sed tamen aniĝas kaj restas membroj por helpi al la organizo internacia; eble tial precipe en Francujo oni demandas, ĉu ne estas tia organizo tro multekosta. ICK kreis al si agadsferon pli modernan; ĝi sukcese penas organizi la propagandan laboron laŭ komuna linio. La sperto de la prezidanto kaj de la aliaj kunlaborantoj pri kontakto kun ICK estas eminenta. Sed ankaŭ pri ICK ŝajnas al kelkaj UEA-anoj, ĉu ĝia funkciado ne estas tro multekosta. La nuna disputo estiĝis ĝuste pro tio, ke al la gvidantaj personoj ŝajnas, ke la enspezoj por la ambaŭ institucioj estas tro malgrandaj. Tio, estas komprenebla kaj eĉ ĝojinda, ĉar ĝi montras disvolvon kaj ampleksigon de la taskoj sur la ambaŭ flankoj. Sed konjekto, ke severa unuecigo alportos pli da mono, estas falsa. „La sumoj, kiujn oni enspezus, severe unuecigante la movadon, ne estus sumigo de la monoj enspezataj laŭ la duobla sistemo, s e d m a l p l i. Tial nuligo de la Helsinki-kontrakto estis eraro, kiu estas nepre reparenda.

Sekvis vigla kaj ampleksa diskuto, kiun komencis per detalaj informoj delegito de ĈAE por parizaj kunvenoj de KR kaj de Ĝenerala Estraro s-ro dro Pitlík. Li akcentis, ke manko de la ĝisnuna ICK estis nereprezento de la fakaj societoj en ĝi. Devus en nova komitato esti iamaniere reprezentitaj ankaŭ la institutoj kaj fakaj societoj, kio alportus al centra organizaĵo profiton ne sole moralan, sed ankaŭ financan.

Post li partoprenis la diskuton sinjoroj Sklenčka, prof. Kožený, dro Fousek, konsilisto Koutek, dro Marek, prof. Smeták. Precipe prof. Kožený detale argumentadis por kreo de nova organizo, kiu kunigus la nunan UEA kaj UFE en ian novan organizon, kiu reprenus la taskojn de la nunaj korporacioj. La diskuto estis en plej amika maniero kaj finis per ĝenerale esprimata konvinko, ke la kunlaboro inter nacia societo kaj UEA, kiu ĉiam estis videbla en nia lando, povus kaj devus esti ekzemplo por diversaj landoj aliaj. La kunveno finis je la 23-a horo. La komitata kunveno ĝin sekvinta redaktis la rezolucion pri reorganizo, proponotan al la ĝenerala kunveno. La redakto okazis dum ĉeesto ankaŭ de interesataj membroj nekomitatanoj kaj povis plene akordiĝi kun ideoj esprimitaj en la diskuto.

S. K.

## I-a komitata kunveno

okazis la 28-an de marto 1933 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis s-roj Echtner, Hromada, Janda, Dr. Pitlík, Slavík, Šustr, f-ino Tarantíková. Senkulpigis sin s-roj Votrubec, Kožený. Leterojn al la kunveno sendis s-roj Dr. Kamaryt, Friedrich, Sklenčka. Prezidis Dr. Pitlík, protokolis Tarantíková.

Post malfermo Dr. Pitlík rememoras morton de prezidinto de l' Esperantista Akademio s-ro J. M.

Warden, kiu estis amiko de ĉeĥa nacio kaj de ĉsl. esperantistoj. La ĉefa punkto estis pritrakto de programo kaj decidoj de la ĝen. kunveno kaj divido de funkcioj, pri kiuj oni interkonsentis jene:

Prezidanto: Dr. Stan. Kamaryt;
vicprezidanto: Dr. Aŭg. Pitlík;
ĝenerala sekretario: Jar. Šustr;
I. sekretario: Fr. Slavík;
II. sekretario: Anna Tarantíková;
kasisto: Otto Sklenčka;
administrado de membroj: O. Sklenčka;
redaktoroj de Bulteno: Dr. Kamaryt, Dr. Pitlík, Slavík;
literaturaj aferoj, antologio: R. Hromada;
turismo: Dr. Pitlík;
lernejaj kaj sciencaj aferoj: Dr. Kamaryt;
junulara komisiono: Echtner V.;
radio kaj gazetara servo: O. Ginz.

Adreso de sekretariejo: Praha XIX., Uralské 447, en ĉiuj aferoj oni povas turni sin al la koncerna komisionestro.

Decidoj: Per cirkuleroj instigi instruistojn-esperantistojn al instruado de Esperanto en lernejoj kaj fari ŝtatajn ekzamenojn, aĉeti 100 ekz. de lernolibro de Šilha, por redakcio de ĉsl. antologio prizorgi librojn: „Elektitaj verkoj de ĉeĥa prozo", fari preparojn por invito de nigra esperantisto s-ro Kola Ajayi, ne lui proponitan ĉambron por Asocia sekretariejo, al ĈEI transdoni proponon de s-ro Krisl (kurso por ŝtata ekzameno) kaj peton de E. K. Mor. Ostrava-Vítkovice (prunto de libroj). En afero de stacidomaj tabuloj laboras s-ro Ginz, Ekspozicia materialo pruntita al E. K. Mladá Boleslav. La redaktoroj de Bulteno estis komisiitaj prizorgi ĉion por baldaŭa ĝia eldono.

---

## Gvidantaro

*de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista por 1933.*

*Komitato:*

*Vuk Echtner, oficisto, Praha-Nusle II.-741,*
*Josef Friedrich, fervoj-konsilanto, Košice, Jarná 13,*
*Rudolf Hromada, fakestro, Praha VII., Sochařská 2,*
*Dr. Stan. Kamaryt, profesoro, Bratislava, Zochova 3,*
*Josef Kožený, profesoro, Ml. Boleslav, Nádražní 158,*
*Dr. A. Pitlík, ĉefsekretario de la kom. ministerio, Praha II., Křemencová 17,*
*Otto Sklenčka, bankoficisto, Hradec Králové, Masarykovo 628a,*
*Frant. Slavík, oficisto, Praha XIX., Uralské 447,*
*Frant. Staněk, studento, Praha XI., Svatoplukova 22,*
*Jar. Šustr, komercisto, Praha I., Dlouhá tř. 53,*
*Anna Tarantíková, ofic., Praha XI., Karlova 8,*
*Josef Vondroušek, banka oficisto, Brno, Dobrovského 6.*

*Vickomitatanoj:*

*Dr. Josef Fousek, Přelouč,*
*Frant. Heikenwälder, Prostějov, Masarykovo 33,*
*Josef Janda, Praha II., Jindřišská 7,*
*Miloslav Staněk, Příkopy 24 (fa Neff), Praha II.,*
*Božena Vlčková, Dubí p. Vrapice,*
*Ferdinand Votrubec, Praha VII., Schnellova 21.*

*Membroj de kontrola komisiono:*

*V. Bujarek, Nové Zámky, Hlavná pošta,*
*Vil. Černý, bankoficisto, Hradec Králové,*
*J. Linke, Lázně Bělohrad,*
*Dr. A. Konečný, advokato, Jaroměř,*
*Fr. Pytloun, fervojisto, Bakov n. Jiz.*

*Vicmembroj de Kontrola komisiono:*

*Fr. Hanzelka, Lazy,*
*A. Holancová, Vyškov,*
*V. Stříhavka, Kladno.*

---

## Monkolektado

### por ekipo de estonta Asocia oficejo.

*Plej urĝa bezono de nia Asocio estas posedi apartan ĉambron, kie niaj funkciuloj povos labori kaj estos konservataj iloj kaj dokumentoj por ilia laboro. Sed antaŭ ol lui ĉambron bezonan ni devas posedi monon por ĝin adapti kaj ekipi per taŭgaj mebloj kaj maŝinoj. Tial nia komitato fondis apartan fondajon oficejan kaj malfermas kolekton inter ĉeĥoslovaka esperantistaro por tiu ĉi celo. Delonge oni parolas, ke ni devas havi salajratan oficiston. Unua kondiĉo estas posedi por li taŭgan ejon kaj laborilojn. Tial helpu al ni ĉiu samideano laŭ sia povo: ankaŭ malgranda donaco proksimigos nin al nia celo!*

### Oficeja fondaĵo.

§ 1. Celo. Estas fondita Oficeja fondaĵo por kolekti monon disponigeblan por aĉeto de oficejaj mebloj, maŝinoj kaj de cetera teknika adaptigo de la Asocia oficejo.

§ 2. Rimedoj de la fondaĵo konsistas el
1) jaraj donaĵoj el la Asocia kaso: la sumojn fiksas jara kunveno laŭ propono de la kasisto;
2) donacoj;
3) rezulto de publika kolektado, kiu estas malfermata;
4) profito de diversaj tiucelaj entreprenoj.

§ 3. Administrado: La fondaĵo estas administrata de la Asocia kasisto sur aparta konto. La oficejaj maŝinoj kaj mebloj povas esti aĉetataj laŭ bezono jam antaŭ starigo de aparta ejo por Asocia oficejo. La fondaĵo povas fariĝi pasiva. Pri aĉeto de koncernaj oficejaj iloj decidas komisiono konsistanta el prezidanto, ĝen. sekretario, kasisto kaj estro de la oficejo. La kasisto raportas en nomo de la komisiono al la ĝen. kunveno.

## Regularo pri ekzamena fondaĵo.

§ 1. Celo. Helpi per parta aŭ tuta rekompenco de la vojaĝaj kaj ceteraj elspezoj al instruistoj de

publikaj lernejoj, loĝantaj ekster sidejoj de la komisionoj, veni al la ekzamenoj pri Esperanto.

§ 2. Financoj. Fondita de ĈAE en jaro 1927 la Ekzamena fondaĵo, post diversaj enspezoj, plejparte el Asocia kaso kaj laŭcelaj elspezoj havis la 1-an de januaro 1932 Kč 374·30. La enspezoj konsistos el:

1) donacoj de bonvolaj donacantoj,
2) donacoj de la Asocia kaso (laŭ bezono). La sumon de ĉiujara donaĵo fiksos ĉiun jaron la ĝenerala kunveno laŭ propono de la kasisto. La fondaĵon administras la Asocia kasisto sur aparta konto.

§ 3. Peti pri rekompenco de la elspezoj kaŭzitaj per vojaĝo al la publikjura ekzameno pri Esperanto povas ĉiu instruisto aŭ profesoro de publika lernejo post sukcese farita ekzameno, kondiĉe, ke li estas membro de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista en la kuranta kaj se li estis membro almenaŭ en la pasinta jaro.

§ 4. Pri la peto decidos la komitato post la bontrovo de la ekzamena komisaro. Pri plenumo decidas la Asocia komitato per simpla plimulto.

## KRONIKO ESPERANTISTA EN ĈSR.

### Oficiala instruado.

*Hradec Králové.* En komerca akademio instruas esp-on en la lernejjaro 1932-33, kiel nedevigan fakon profesoro Fr. Smeták 12 studentojn. Ĝi estas jam la sesa sinsekva jaro, dum kiu esp-o estas instruata en tiu ĉi lernejo.

*Lektorato de Esperanto* ĉe la alta politeknika lernejo (fakultato por specialaj sciencoj) en Praha, fondita en la j. 1922, daŭrigas sian laboron laŭ la decido de la profesoraro de la 8. III. 1933 n-o 315 kaj dekreto de la ĉsl. ministerio por instruado de la 17. II. 1933, n-o 157.536-IV. 3-32. Instruas lektoro dro A. Pitlík.

### Kunvenoj de nordbohemiaj esperantistoj

fariĝas pli oftaj. Dum la jaro 1933 okazis en Horní Litvínov (15. I.), Teplice-Šanov (26. II.), Bilina (9. IV.). Partoprenis ĉiam 30—40 p. La partoprenintoj pridiskutis organizon, lingvajn demandojn, propagandon, gazetabonon, kongreson en Köln, nove aperintajn librojn. Kiel invitantoj por la lasta kunveno subskribis sin prof. Max Murath (Teplice) kaj faka instruisto Lad. Krisl (Lom).

### 10 jara fondiĝa datreveno de Ĉsl. esperanta instituto.

Ĉ. E. I. okazigis la 24. II. 1933 en Praha ĝeneralan kunvenon, dum kiu prez. dro Pitlík rememoris ĉiujn dekjarajn laborojn kaj penadon de ĈEI, rilatantajn precipe al instrua kaj prelega flankoj de poresperanta propagando.

La kunveno decidis: 1) Varbadi novajn membrojn aktivajn kaj korespondantajn precipe inter la ŝtate ekzamenitaj instruistoj, esp. kursgvidantoj, ĉsl. esp. literaturistoj kaj ĉsl. pioniroj de Esperanto, 2) viglan kontakton kun eksterlandaj esp. institutoj rilate al la fakaj spertoj kaj preparo de internacia instituta organizo, 3) en la internacia centro „reorganizita" postuli postenon por esp. institutoj kaj fakaj societoj, kiuj kiel tria faktoro helpus la internacian movadon mone kaj ideale, 4) aranĝadi regulajn prikaj peresperantajn prelegojn kaj dum oktobro 1933 malfermi la II-an ŝtatan kurson.

### Skoltoj.

En 18 lokaj grupoj de Ústredie slovenských katolíckych skautov (Centro de slovakaj katolikaj skoltoj) lernas geskoltoj esp-on. Tiu ĉi fakto estas ŝuldata precipe al s-ro A. Macek, centra sekretario de la societo kaj responda redaktoro de la gazeto Skaut. Por la germana kaj hungara skoltaj trupoj en Bratislava gvidas unu komunan kurson s-o K. Kiss kaj por hungarlingvaj skoltinoj la duan. Ankaŭ A. Macek gvidas en Bratislava kurson por skoltoj slovakaj. Kursoj dum tiu ĉi sezono funkciis aŭ funkcias en Komárno, Nové Zámky (2), Levice, Rimavská Sobota. En Košice partoprenis kurson de s-ro Friedrich 15 skoltoj. En Subkarpata Rusio ni sukcesis varbi izolulojn en Výtok, Tačovo, Mukačevo, Streda nad Bodrogom. Ni scias ankoraŭ pri kursoj en Brno, Dobruška, Olomouc, Poruba, Prostějov (2). Skoltoj-esp-istoj laboras ankoraŭ en Kopřivnice, Třebíč, Uherský Brod, Semily, Jablonec n. N., sed oni ne scias ĉu funkcias kurso aŭ ĉu lernas sole izoluloj. En Praha propagandas fervore St. Lešinger. La germanlingva revuo Unser Pfad aperigis artikolon pri E. de s-ro Čech, la slovaklingva „Skaut" enhavas diversajn sciigojn mallongajn pri la esp-o-movado, la ĉeĥlingva Pražský skaut enhavas neregule kelkajn artikoletojn, la hungarlingva Tábortüz enhavas en ĉiu numero artikoletojn pri E. kaj alvokojn ĝin lerni. La ĉeĥlingva oficiala revuo Skaut-Junák neaperigadis informojn pri Esperanto, eĉ se oni sendis al ĝi. Tial ĈAE aldonigis al ĝia numero de aprilo 1933, kiel pagitan aldonon flugfoliojn Pojítko (3000 ekz.).

(Laŭ informoj de A. Csáder.)

## LOKAJ INFORMOJ.

**Mladá Boleslav.** E. Klubo havis ĝeneralan kunvenon 31. I. La kunveno pridiskutis la reorganizon de la internacia movado kaj novaranĝon pri la Asocia organo. Detala rezolucio pri tio estis sendita por la jarkunveno de la ĈAE. La klubo pagis kotizon al ĈAE por ĉiuj siaj membroj kaj decidis fari same ankaŭ en la j. 1933. Dum elekto de la komitato estis reelektitaj s-ro MUDr. Karel Marek, prezidanto, s-ro Karel Flek, sekretario, novelektita s-o Vavřín

kiel kasisto. Adresoj de sekretario: Mladá Boleslav III-241, de kasisto Mladá Boleslav II-380.

**Lom u Mostu.** Publikan kurson en printempo 1933 por 12 p. gvidas s-ro Ladislav Krisl, faka instruisto.

**Brno.** Amuza vespero de la Klubo 16. XII. 1932 bonege sukcesis laŭ vizito kaj programo. La venintojn bonvenigis prez. Baďura, s-ro Hoffner trafe pritraktis la rolon kaj vojon de esp-o. Estis ludita duakta komedio „Gasto", en kiu eminentis per lerta kaj artisma aktorado s-ino Adamcová, f-ino Ondráčková, bulgara samideano Nedkof, s-roj Nečas kaj Bečan. S-ro Mašek prezentis majstran violonludon. Ĥoro de katolika esp-ista klubo kaj lernantoj de s-ro instruisto Jeřábek prezentis kantojn. Dum paŭzoj koncertis orkestro. — Daŭra libra ekspozicio estas en la klubejo dum ĉiu kunveno. Estas ekspoziciataj eldonaĵoj de Literatura mondo, Ekrelo, Japana Instituto, Heroldo k. a. kaj la membroj povas ilin aĉeti je rabatitaj prezoj kaj por partopagoj. — La ciklostilita Informa Bulteno aperas daŭre, redaktate de s-ro E. Sonnenfeld. En februaro 1933 aperis ĝia 14-a numero; ĝi estas destinita por la informo de la membraro kaj estas senpaga. — Ĝenerala kunveno de la klubo estis 5. III. Estis elektitaj: prezidanto Frant. Válka (Brno-Královo Pole, Masarykova 21.), vicprez. Rudolf Nečas, sekretario Jos. Vondroušek, kasisto Jan Poláček, bibliotekistino s-ino Štěp. Šmardová, asesoroj Th. Kilian el Třebíč, f-ino M. Vodáčková, Jar. Hoffner; anstataŭantoj E. Sonnenfeld, Frant. Weigl; revizoroj Bed. Šrámek, Josef Jeřábek, Bed. Freund. — Nova kurso estis aranĝita de „Societo typografia" kune kun la klubo; ĝi komencis 21. III. kaj daŭros 4 monatojn. Kotizo 20 Kč. Por ĝia propagando estis eldonita presita flugfolio pri esp-o.

**Bakov n. J.** Tria ĝenerala kunveno de la E. Klubo estis 26. III. dum ĉeesto de 35 samideanoj venintaj krom el Bakov ankoraŭ el Ml. Boleslav, Mnichovo Hradiště, Č. Lípa, M. Bělá, Buda. La klubo dankas precipe al la samideana klubo el Mladá Boleslav, sendinta multajn partoprenintojn kaj s-inon Šolcová, kiu belege prezentis esperantajn kantojn kaj spritaĵojn. Ankaŭ aparte menciinda estas s-ro Kovařík el Č. Lípa, veninta bicikle el 45 km-a distanco. Kun la jarkunveno estis aranĝita letervespero, al kiu venis 58 leteroj el 16 landoj. Belan donacon sendis s-ro Hanuš, fervoj-oficisto el Č. Lípa; ĝi estas kolekta monujo en formo de kvinpinta stelo; la ĉeestantoj tuj sukcesis plenigi ĝin per kronoj, pro kio la estraro kluba dankegas. La kunveno decidis, ke la klubo membrigos al ĈAE ĉiujn siajn anojn. Nova estraro elektita estas: Pytloun, Peroutka, Srb, Pulcman, Moc, Veselý.

**Košice.** Ĝenerala kunveno de la E. Klubo estis 16. I. 1933. En j. 1932 havis la klubo 33 membrojn (de 5 lingvoj) el kiuj 27 estis anoj de ĈAE kaj 6 anoj de GEL. Krom ili havas la klubo 3 membrojn dumvivajn. La klubo aranĝis 2 kursojn por ĉeĥoslovakoj (gvidis J. Friedrich, ĝis fino restis 47 p., el ili multaj studentoj kaj skoltoj) kaj du kursojn por hungaroj kaj germanoj (gvidis D. Krémer, ĝis la fino restis 15 p.). — La klubo partoprenis per speciala fako la ekspozicion de tutmonda preso en Košice kaj tiel vidis la espo-ekspozicion 22.000 vizitantoj. En la ekspozicia katalogo estis ankaŭ informa artikolo pri esp-o. La klubo ricevis unuan fojon urban subvencion da Kč 100·—. La urba biblioteko abonas Heroldon de E. kaj Praktikon. La ĉiulundajn kunvenojn vizitadis 12—20 klubanoj. La nova komitato: Prez. J. Friedrich, vicprez. D. Krémer, sekr. J. Maštalíř, kasisto K. Sultety, bibl. J. Krištof, prot. f-ino Krémer.

---

## ESPERANTISTA VIVO.

**Jubileo.** Gimnazidirektoro Josef Eiselt, prezidinto kaj honora membro de ĈAE, festis la 12. III. 1933 sian 75-an naskiĝtagon. Koran bondeziron.

**La unua episkopo-esperantisto.** Dro Ant. Eltschkner, metropolita kanoniko, prezidanto de la Ligo de katolikaj esperantistoj en ČSR. kaj de Klubo de katolikaj esperantistoj en Praha estis en februaro 1933 nomita episkopo en Zefirio kaj helpepiskopo en Praha. Lia episkopa moŝto esperantiĝis en la j. 1924 kaj depost tiu tempo estas aktiva esperantisto. Ĉs. esperantistoj gratulas lin kaj ĝojos pri lia plua kunlaborado sur kampo esperantista.

**Edziĝo.** Martin Novosad kaj Azraela Laban en Trnava, geedzoj per Esperanto. 1. IV. 1933. Sinceran gratulon!

---

Al niaj membroj kaj al ĉiuj ĉl. samideanoj ni rekomendas pasigi nunjaran libertempon dum julio kaj aŭgusto en Lázně Bělohrad. Broŝuron kun detalaj informoj ricevos senpage ĉiu interesiĝanto ĉe E. K. Lázně Bělohrad.

En la jaro 1931 loĝis en tiu somerrestadejo 39 esperantistoj el 8 landoj, kiuj estis tre kontentaj pri la loko kaj la samideana societo.

---

*Bona donaco por viaj eksterlandaj amikoj:*

*Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo. La kajero enhavas reproduktaĵojn de Švabinský, Preisler, Obrovský, Čermák k. a., tradukojn de Baar, Čapek, Machar, Vrba, Sova, Wolker k. a. Prezo 6 Kč afrankite. Mendu ĉe Sekretariejo de ĈAE.*

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík.
Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933.